# LANTI

## ★ Herezulo

## ★★ Herezaĵo

Suplemento
de

La Juna Penso
F 47340 Laroque Timbaut
n°103B * 1975*1,50 FF

E. Lanti

# ★ Herezulo

# ★★ Herezaĵo

ENHAVO


✻ Gvidpunktoj de "Herezulo" ...3

✻ Herezaĵo ..11

✻ Polemiko pri Sennaciismo :

- Publika letero pri Sennaciismo (V. Bosk) ..29
- Ĉia diletantismo estu for ! (respondo de E. Lanti) ..35

✻ Ĉiu plenumu sian devon... ..41


La Juna Penso
F 47340 Laroque Timbaut

# G V I D P U N K T O J

de

# "H E R E Z U L O" ✲

HEREZULO

libere, severe, sed objektive kaj sincere kritikas ĉion kaj ĉiujn. Ĝi kondamnas neniun sincerulon.

HEREZULO

senkompate vipas ĉiajn absolutulojn kaj celas direkti la homojn al relativisma kompreno pri la vivo, kio estas nepra kondiĉo por ke ekzistu inter ili toleremo kaj paco.

HEREZULO

celas la malaperigon de ĉiu nekunnaskita, neesenca diferenco inter la homoj el la tuta mondo kaj ilian sennaciecan unuiĝon.

HEREZULO

subtenas ĉion, kio miksas kaj lutas inter si la popolojn kaj levas la homojn al pli deca, pli digna kaj pli larĝhorizonta vivo.

HEREZULO

rekomendas al la proletoj, al la ekspluatatoj, ke ili batalu nur por akiri ĉiam pli bonajn vivkondiĉojn, pli da libero, pli da ŝatateco, kaj neniam pro teorioj, doktrinoj aŭ sistemoj, kiujn ili ne tute komprenas kaj pri kiuj fakuloj interdisputas.

HEREZULO

luktas kontraŭ ĉian gvidistecon - kio ne signifas malakcepton al ĉia gvidado.

HEREZULO

kontraŭbatalas ĉian emon al apartigo de l'homoj laŭ du kategorioj : intelektuloj kaj manlaboristoj. Ĉiu homo devas celi al mana kaj intelekta lerto.

HEREZULO

resumas sian tutan programon per du krioj : For ĉiajn dogmojn kaj diktatorojn! Vivu justo kaj libero!

o o o

✲ "Herezulo", revuo de la "Sennaciista Frakcio" de SAT, aperis de januaro 1935 ĝis decembro 1936.(Kompil.noto)

# KLARIGOJ
## pri la
# GVIDPUNKTOJ

Leginte en la unua kajero de HEREZULO la ok gvidpunktojn, laŭ kiuj ni intencas redakti la revueton, kelkaj K-doj skribis, petante klarigojn. Tiujn ni volonte donas.

Unu leganto diras : "Vi volas kritiki ĉion k ĉiujn, tio ŝajnas al mi ne aprobinda; tiel vi agos nur negative, detrue, dum estus pli saĝe fari pozitivan, konstruan laboron..."

Ni facile komprenas la preskaŭan indignon de nia korespondanto. Li tamen bonvolu tute kvietiĝi k bone pripensi la sencon de l'vorto kritiki. Ĝi ne havas nepre la signifon mallaŭdi, malaprobi. Oni eĉ povas laŭde kritiki verkon. Sekve neniu vidu en tiu nia unua gvidpunkto ian malbonan intencon, ian ajn malican mallaŭdemon. Cetere, al ni mem devas ankaŭ esti aplikata tia kritikemo. Kaj se nia K-do aplikus ĝin al si mem, li eble pli ĝuste komprenus la signifon de la gvidpunkto, kiun li malaprobas. Tie estas ja dirite, ke ni "kondamnas neniun sincerulon". Tiuj lastaj vortoj montras do, ke nia unua gvidpunkto estas nenial malbonintenca.

Kritiko estas necesa k ĝia manko en homaj socioj, en organizoj, signas tendencon al kreiĝo de dogmoj, al stariĝo de diktatoroj, al malaltiĝo de l'homa digno k finfine al enplantiĝo de sklavecaj socisistemoj.

Estas ja vere, ke nura kritiko ne alportas ion pozitivan. Ĝi eĉ povas esti efektive detrua. Sed plej ofte detruado estas unue necesa antaŭ ol komenci konstruadon. Aliparte, konstrui, ekzemple, kazernojn, tio estas pozitiva laboro sed neniel utila por la homaro. Ĉia ajn "pozitiva" laboro sekve ne estas laŭdinda, dum negativa, detrua agado povas kelkokaze esti utila.

Ni firme opinias, ke la laborista movado estas orientita laŭ malĝusta direkto. La sinsekvaj fiaskoj en plej diversaj landoj montras tion al ĉiu, kiu ne estas dogme blindigita. La malatento de l'gvidistoj al la esperanta afero, al la neceso faligi la lingvajn barojn

inter la homoj, antaŭ ol rekomendi al ili unuiĝon, ĉiam ŝajnis al ni konscia aŭ senkonscia perfido al la laborista klaso. Bedaŭrinde eĉ ne ĉiuj laboristaj esperantistoj konscias pri tio; multaj emas ankaŭ konsideri nian aferon kiel akcesoran.

Tamen estas sufiĉe atentinda fakto, ke centjara internaciisma propagando k agitado rezultigis nur la venkon de l'naciismo en la tuta mondo. "Proletoj el ĉiuj landoj, unuiĝu!" alvokis Marks k Engels (...) Sed tiu unuiĝo neniam havis realan fundamenton. La diversaj Internacioj fiaskis en sia agado, tial ke ilia tuta ŝajnvivo rezultis nur el la interrilatoj de kelkcentoj da gvidistoj. En krizaj momentoj homoj perdis ĉian influon sur la amason k plejofte havis personan intereson renegatiĝi. Kaj tiel estos, tiom longe, kiom la homoj el la tuta tero ne havas la eblon intime, senpere konatiĝi k organiziĝi. La ĝisnuna internaciisma organizsistemo estas la plej granda iluzidona afero, kiun oni povas imagi.

Ĉion tion nia kritiko celas malkaŝe k sentime diri al niaj samsortanoj. Se tiu nia agado estas negativa k detrua, nu, tio ne ĝenas nin : necesas ja detrui danĝerajn iluziojn. Ni konsideras kiel devon rekomendi al niaj Gek-doj, ke ili vane k senrezulte ne batalu; ke ili ne eluzu sian energion, irante laŭ malĝusta direkto.

Ĉu do ni trompu nin mem k trompu aliajn ? Ĉu indas, ke liberpensantaj homoj sin lulu per iluzioj ? Ĉu saĝa homo devas ankaŭ konduti freneze, se li troviĝas inter frenezuloj ? Ni gardu nin kontraŭ ĉiaj vanaj esperoj; ni lernu scii ĝuste taksi k ĝui la staton de homo, kiun gvidas racio k ne blinda entuziasmo. Ĉu ne estas ĝuinda sento la konscio esti saĝa inter malsaĝaj ? Se ni ne povas ĉiam teni nian korpon libera, almenaŭ neniu registaro, neniu diktatoro, neniu gvidisto posedu nian spiriton, nian animon. Eppur si muove (kaj tamen ĝi moviĝas), diris la granda herezulo Galileo, kiam la inkvizicio devigis lin publike malkonfesi sian opinion, ke nia planedo turniĝas.

Jes, ja ni kritiku ĉion k ĉiujn, tiel ke nur per tia sinteno ni restos liberaj homoj inter sklavoj.

Longe ni povus skribi, donante konkretajn ekzemplojn por pravigi nian unuan gvidpunkton. Sed ni sufiĉe alte

taksas la intelektan nivelon de niaj legantoj, por ne dubi ke ili mem kapablas akiri per propraj observoj k konstatoj ĝustan komprenon pri nia penso, pri nia celo.

.....

La dua gvidpunkto rekomendas relativismon pri vivkompreno.

"Ĉu do vi neas la ekziston de absolutaj veroj ?" demandas iu; "ĉu, ekzemple, vi ne agnoskas la absoluton de la matematikaj principoj ?"

Kiam temas pri abstraktaĵoj, oni ja povas apliki absolutajn principojn : du plus du estas kvar ĉie k ĉiam; sed du homoj plus du homoj neniam estas kvar tute samvaloraj estaĵoj. La samon oni povas eĉ diri pri objektoj. Sekve, la disciplino aplikebla en matematiko neniel taŭgas en sociologio. Mi tre timas la absolutulojn,kiuj ne komprenas tion k havas la pretendon esti kapablaj eldiri la veron pri soci-politikaj demandoj per rezonmaniero, taŭga nur en alia fako.

"Nenion pli belan mi konas ol apliki perforton por venkigi veron k juston." Jakobo Frederiko Fries.

Tion antaŭ nelonge mi legis hazarde sur la kovrilo de revuo, kies ekzempleroj estis elmetitaj vendcele en esp-a kunvenejo. Tia eldiro preskaŭ timtremigas min. Kiu granda saĝulo difinos tute precize k senerare tion, kio estas la vero k justo ? Kredeble la redaktoro de l'koncerna revuo opinias esti tia saĝulo k sendube pretas apliki aŭ apliki de policanoj perforton por venkigi sian veron, sian komprenon pri la justo. Stalin, Musolini, Hitler ankaŭ aplikas tiun belan maksimon de l'germana filozofo. Kaj milionoj da entuziasmuloj helpas en tio. Tiuj diktatoroj estas certe tute konvinkitaj, ke ili agas laŭvere k laŭjuste. Tamen la "vero" k la "justo" de Stalin ne tute samas kun tiuj de Hitler.

Jes, ja! "H-ulo" vipos ĉiajn absolutulojn, kiuj, konscie aŭ nekonscie, preparas la sklavecon de l'homaro, aŭ helpas pluigi ĝin tie, kie ĝi ekzistas. Sed rilate kelkajn absolutulojn, vipilo ne necesas; sufiĉas ridi al ili en la vizaĝon, aŭ simple leveti la ŝultrojn ĉe la aŭdo de iliaj pretendemaj filozofiaĵoj.

Dume ni rediru, ke rilatoj ne povas esti pacaj k glataj inter la homoj, se ili ne havas relativisman komprenon pri

la vivo, kiel estas dirite en la dua gvidpunkto.

.....

Kiu legis supraĵe la trian gvidpunkton, tiu eble povas pensi, ke ni celas sammodeliĝon, unutipiĝon de l' tuta homaro. Tiel tamen ne estas. Tute male eĉ. Serioza k profunda pripensado komprenigas, ke la kunnaskitaj diferencoj, ekzistantaj pli malpli inter ĉiuj senescepte homoj, povus pli facile malvolviĝi k sin montri, se forestus ĉia diktatoremo, ĉia absolutemo en la pensoj k moroj..

Estas evidente, ke nacia lingvo, nacia edukado ne estas io kunnaskita, sed rezultas de situacioj k cirkonstancoj, kiuj ne estas ĉiamaj, kiuj eĉ ofte ne plu ekzistas konkrete. Ju pli la homoj estos memstare pensantaj, ju pli ĉiu el ili deziros esti unika specimeno de l'homa genro k ne iu naciano, des pli ekzistos da ŝancoj, ke la kunnaskitaj diferencoj elkreskos.

Post ĉi tiu klarigo neniu sincera homo povos do aserti, ke nia deziro al sennacieca unuiĝo de l'tutmondo celas unuformecon. La sennaciismo tute ne signifas unutipecon de l'homoj; ĝi ne celas al griza, unutona, banala homaro, sed male al originaleco ĉe ĉiu individuo, al varieco inter ĉiuj teranoj.

Supraĵa lego super la kvara gvidpunkto povus ankaŭ pensigi pri ia unutipa kunfandiĝo de ĉiuj rasoj. Tia ne estas nia penso k cetere ni scias, ke fiziologie tio ne eblas. Tamen la rasismo estas nenatura, monstra teorio. Malpermesi aŭ eĉ malrekomendi la geiĝon inter malsamrasaj individuoj, tio estas tute arbitra. Laŭ la rezonmaniero de rasistoj oni povus same sofisme "pruvi", ke nur geiĝo inter homoj, havantaj la saman koloron de okuloj, aŭ de haroj, devas esti permesata.

Ne malpli arbitraj estus reguloj, bazitaj laŭ la formo de l'nazo, la grando de l'buŝo aŭ la longo de l' kapo. Eble iam troviĝos iu "scienculo", kiu argumentos, ke la tuta malbono en la mondo venas de tio, ke oni ne malpermesis geiĝon inter brakicefaloj k dolikocefaloj...

Kiam ni parolas pri mikso k luto inter la popoloj, ni pensas, ke la homoj devas unue k ĉefe konscii pri sia homeco k ne pri sia nacieco aŭ raso, kio neniel signifas, ke ĉiuj devas fariĝi samtipaj. Ĉiuj homoj estas teranoj,

ricevas lumon k varmon de l'sama suno; la saĝo ordonas, ke ili do forte konsciu pri tio k organizu la socion laŭ maniero, kiu ebligos ĝuadon el ĉiuj riĉaĵoj de nia komuna planedo.

.....

Jam aperis klarigoj pri kvar el la punktoj, kiuj signas al ni la vojon k montras nian apartan komprenon pri kelkaj soci-politikaj demandoj. Daŭrigante tiun klarigadon, ni tuj rimarkigas, ke la kvina punkto (oni bv. relegi ĝin sur p. 3 - Kompil. noto) fakte estas sufiĉe klara per si mem. Ŝajnas al ni ja tute evidente, ke simplaj laboristoj ne povas legadi, kompari k primediti la tezojn de l'diversaj soci-politikaj skoloj, por eltrovi, kiu el ili estas la plej ĝusta. Marks, Prudon, Bakunin interdisputis dum jaroj k ĉiu el tiuj teoriuloj havis siajn respektivajn aprobantojn. Poste Pleĥanof, Lenin, Rosa Luksemburg same interbatalis per tezoj. Nuntempe Kaŭcki, Stalin, Trocki k.a. pli malpli famaj marksistoj interdisputis pri la plej ĝusta interpretado al la verkoj de sia majstro. Tia interdisputado estas interesa nur en tiu senco, ke ĝi montras la argumentkapablon de homoj. Sed fakte ĝi pruvas nenion.

Ĉiu el ni ja scias, ke tre lerta advokato iafoje sukcesas montri plej fian krimulon kiel simpatian homon; dum mallerta pledisto lasas kondamni senkulpulon. La lerto de dialektikulo estas tamen admirinda pro simila motivo laŭ kiu oni admiras la forton de atleto. Sed ĝi pruvas nur, ke ni devas dialektikumi, por teni vigla nian intelekton, same kiel oni gimnastikas por ke nia korpo estu sana k fortika.

Atleto kutime marŝas kiel ordinara homo k ne ĉiam kuras k saltas rekordcele; simile al tio ni lasu nin gvidi per la simpla saĝo, kiam temas decidi pri ordinaraj aferoj en nia vivo. Kio koncernas nin mem, kio tuŝas nin en nia karno, en nia intima vivo, pri tio neniu pli bone ol ni povas prijuĝi.

En la XVI-a jarcento homoj interbatalis kaj mortigis unuj la aliajn, tial ke teologoj havis malsaman komprenon pri kelkaj partoj el la Biblio. Ĉu ne estas same bedaŭrinde k ridinde, kiam en nia epoko ni vidas proletojn, kiuj pugne interbatalas, tial ke doktoroj je marksismo ne inter-

pretas tute same "La Kapitalo"n ?

En Sovetio la laboristoj lasis sin sklavigi en la fabrikoj, tial ke gvidistoj konvinkis ilin per marksaj eldiroj, ke necesas, por "konstrui socialismon", labori pli streĉe, pli rapide k pli senpostule. La kruda rezulto de tio estas, ke la marksismo-klarigantoj konsistigas nun novan klason kun privilegioj diversspecaj. Tiel en ĉiuj tempoj pastroj el ĉiuj religioj bone sukcesis havi komfortan vivon inter mizeraj piuloj...

°°°

La <u>sesa punkto</u> estas la logika konsekvenco de la kvina. Tial ke ni ne volas toleri ian ajn pastrecon, la gvidado de organizo, ĉu sindikata aŭ partia, ne devas fariĝi profesio. Ni akceptas gvidantojn, ne gvidistojn. Kiu havis gvidan postenon dum kelkaj jaroj, tiu devas reiri al la fabriko k sperti denove la tiean laborkondiĉojn. Nur tiel oni povas eviti la fariĝon de novaj privilegiuloj.

Kelkfoje mi jam havis la okazon konstati la mensan aliiĝon de proleto, fariĝinta gvidisto. Tiaj homoj pli malpli senkonscie akiris la spirito-staton de mastroj, de komandantoj k rilatas al siaj subuloj kiel al ia homa materialo. Ili plie sentas malŝatemon al siaj gvidatoj. Kaj tial ke ili akiris sian gvidistecon proprarimede k ne kiel sekvo de longjara studado en altgrada lernejo, tiuj homoj tute nature emas pensi, ke ili estas kvazaŭ de dio elektitaj por komandi k obeigi. Kompreneble ekzistas esceptoj; sed inter la milionoj da pastroj sendube troviĝas ankaŭ kelkaj sanktuloj. Tiurilate la escepto konfirmas la ĝeneralan regulon. Tia spiritostato ĝerme entenas la elementojn por la stariĝo de novaj privilegioj, de nova ekspluatema klaso. Tio estas nun konstatebla en Sovetio, kie la novaj estroj ĝenerale kondutas pli krude k senkompate ol la malnovaj.

Tiaj gvidistoj famiĝis; iliaj manoj seniĝis je kaloj k jen okazas, ke ili ne plu sentas sin hejme, kiam la hazardo igas ilin interrilati kun malnovtempaj laborkunuloj. Ili nun preferas rilati kun t.n. intelektuloj, kiuj ĝenerale bonakceptas ilin k iel rigardas kiel kuriozaĵon. Iom post iom la proleteca sento de gvidistoj foriĝas k tiel kreiĝas la tipoj de nova reganta klaso...

Neniam ni forgesu, ke la socialismo ĉiam havis kiel celon forigi la klasojn. Sed tio ne okazos mirakle,per mi ne scias kia mistera procedo de l' "produkto-fortoj". La klasoj malaperos nur kiam la homoj ne plu toleros la ekziston de gvidistoj, kiam ĉiu laborulo konscios pri sia valoro en la produktado k estos akirinta senton pri digno; kiam la manlaboro ne plu estos konsiderata kiel io malsupera k evitinda; kiam oni ne plu parolos pri "manlaboristoj" k "intelektuloj"; kiam ĉiu homo havos la eblon lertiĝi mane k intelekte...

Ĉi tiu lasta demando rilatas al la sepa punkto de niaj gvidideoj. Sed spaco mankas por pritrakti ĝin. Mi do simple memorigos al legantoj, ke ĝi jam estas pritraktita sur la paĝoj 100-1-2-3 de "Vortoj" (Sur la p. 32/34 de "Pri edukado" , LJP-broŝuro, Kompil.noto). Interesiĝantoj bonvolu do legi aŭ relegi tiun artikolon kies titolo estas : INTELEKTULO ? MANLABORULO ?

E. L.

Kompil. noto : Tiuj "Klarigoj pri la gvidpunktoj" aperis en 1935 kaj 1936 en la revuo "Herezulo".

# Herezaĵo

Letero de E. Lanti

al la malkontentaj legintoj de "Absolutismo" *
(ankaŭ la kontentaj legintoj havas intereson legi ĉi tiun leteron)

> "Nia fincelo estas la neniigo al la ŝtato, t.e. al ĉia organizita k sistema perfortado, al ĉia perfortado kontraŭ homoj ĝenerale."
>
> LENIN
> en "Ŝtato k revolucio" (1917)

<u>Noto de LJP-broŝurservo</u> : Tiu teksto estas represita surbaze de la dua senŝanĝa eldono, kiu entenis jenan averton :
"La legantoj estas tamen petataj atenti, ke la lastatempaj okazintaĵoj en Sovetio : la murdo al Kirov fare de l'komunisto Nikolajev k la 119 ekzekutoj (laŭ la oficialaj informoj; verŝajne la nombro estas pli granda) kiuj sekvis kiel revenĝo de Stalin, - pravigas pli ol necese la enhavon de ĉi tiu pamfleto."

* "<u>Absolutismo</u>" restas havebla en LJP-broŝuro n°95A kontraŭ 1 FF aŭ 1 respondkupono.

Parizo, oktobro 1934.

Al Gekamaradoj M.A., B.V., K.S., k.a....

Estimataj,

Kuŝas antaù mi viaj leteroj per kiuj vi bonvolis diri vian malaproban opinion pri la enhavo de ABSOLUTISMO. Kelkajn aliajn mi ankaù ricevis, sed mi metis ilin flanken : iuj laùdas senrezerve la verketon, la aliaj diras nur insultojn. Evidente, al tiaj skribaĵoj estas tute senutile respondi. Ĉar vi ne laùdas nek insultas, sed emas bonkamaradece diskuti, mi deziras danki al vi pro via honesta malaprobo k samtempe mi volas pravigi mian vidpunkton antaù vi.

Unue mi notis kontente, ke al la ĝenerala tezo pri absolutismo vi konsentas. Kio malagrable tiklas vin k eĉ dolore pikas, tio estas, ke mi metas en la saman kategorion la diktatorecojn de Stalin, Musolini k Hitler. Kredu, estimataj Gek-doj, ke mi tre bone komprenas vian malemon akcepti tiun mian opinion. Dum longa tempo, mi devis kvazaù batali kontraù min mem por forskui miajn iluziojn karajn pri Sovetio. Mia sento forte kontraùstaris al mia racio. Tio estas tute natura. Dum almenaù dek jaroj mi konsideris la landon de la Oktobra Revolucio kiel la unuan bastionon, kiun konkeris la Proletaro en la kapitalisma fortikaĵo. Al Moskvo iris miaj esperoj k mi fidis al la Komunista Internacio por gvidi la batalojn de la eksplutatoj en la tuta mondo. Sendube mi vidis mankojn k bedaùrinde erarojn faritajn. Sed ili ne estis esence gravaj k neniu organizo povas havi la pretendon esti ne-erarkapabla. Nur katolikoj havas tian kredon rilate al la papo. Sed, en 1928, sub la influo de Stalin k.a., estis proklamata la tezo pri eblo starigi socialismon en unu sola lando. De tiam, ĉiu atenta observanto povis rimarki ke sub la masko de revolucieca frazaro, Komintern pli k pli fariĝas instrumento en la servo de l'Sovetia Diplomatio. Ŝajnas al mi absolute neeble klarigi al si la stultan, kriman politikon de Komintern dum la lastaj ses jaroj,

se oni ne komprenas, ke la ĉefa zorgo de Moskvo ne plu estis prepari la mond-revolucion, sed atenti precipe pri la naciecaj, ŝtataj interesoj de la Stalina diktatoreco. Estas fakto, ke la laboristaj, revoluciaj movadoj el ĉiuj landoj estis malfortigataj pro la skismaj instrukcioj, venintaj el Moskvo. Tie oni havis kiel ĉefan celon fari el la Kompartioj k el la kompartie gvidataj organizoj aparatojn blinde, serveme obeantaj al la ordonoj de Stalin k de G.P.U. - Kaj tiu abomeninda, monstra plano tre bone sukcesis. Nuntempe oni povas tre facile vidi ĝian aplikon en Francio.

Vi sendube jam scias, ke ĉi tie komunistoj k socialistoj faris lastatempe interkonsenton k nun kunlaboras amike. Tamen antaŭ nur kelkaj monatoj, oni povis legi ĉiutage en "La Homaro" (L'Humanité), la organo de l' Kompartio, ke la socialistoj estas la plej danĝeraj malamikoj de la laborista klaso, la plej fiaj perfiduloj k ke ili evidente preparas la venkon de l'faŝismo. Pro tio ili estis dum jaroj nomataj "social-faŝistoj". Kaj jen subite, tute neatendite, la Kompartio ĉi tiea proponas al tiuj "perfiduloj" komunan agadon. En la kompartiaj presaĵoj ĉesis aperi atakoj k insultoj kontraŭ la Socialista Partio. Kiel do tio povis okazi ? Al tiu demando oni povas fari nur jenan respondon : el Moskvo venis la ordono ŝanĝi la taktikon. Sed tio stargas alian demandon : kial Stalin tiel ordonis ? Nu, por kompreni ĝuste tian returniĝon, sufiĉas rigardi al Genève, kie "K-do" Litvinov interkonsente k amike kunlaboras kun S-ro Bartu (Barthou), la franca ministro por eksterlandaj aferoj.

Ne kredu ke mi fantazias aŭ kalumnias, kiam mi parolas pri amikeco inter Litvinov k Bartu. Antaŭnelonge la internacia Asocio de la ĵurnalistoj rajtigitaj ĉe la Ligo de Nacioj aranĝis bankedon al kiu partoprenis la konsilantoj de ĉi tiu lasta Institucio. Tiuokaze la reprezentanto de la imperiisma Francio gratulis sian Sovetian kolegon, pro lia nova sinteno antaŭ la Ligo de Nacioj, k Litvinov respondis : (laŭvorte)
"Koncerne min, mi simple konstatas, ke hodiaŭ ni estas sinceraj k lojalaj amikoj".

Vi ja certe scias, ke la Ligo de Nacioj estis ĉiam

antaŭe konsiderata, en Moskvo, kiel Asocio de imperiistaj rabistoj. Kaj la tuta agitado de l' franca kompartio celis montri, ke Francio estas la ĉefa rabisto, ke ĝi staras unuavice de tiuj, kiuj preparas militon kontraŭ Sovetion, ktp, ks. - Kiu esplorus la kolekton de LA HOMARO el la lastaj jaroj, tiu povus mire konstati, ke preskaŭ ĉiutage la redaktoroj alarmis pri la danĝero de TUJA MILITO ("guerre imminente") kontraŭ Sovetion. Kaj se iu diris sian dubon pri tio, tiu estis tuj insultata kiel "kontraŭ-revoluciulo", "social-faŝisto", k similaj predikatoj, kutime uzataj malavare de bolŝevikoj...

Cetere, la 6a kondiĉo el la 21, kiuj reguligas la akcepton de partio en Komintern, tekstas jene :
"6) Ĉiu partio deziranta aliĝi al la III-a Internacio havas kiel devon deklari, ke ĝi malaprobas tiel same la konfesitan social-patriotismon, kiel la hipokritan k falsan social-pacismon , sisteme demonstri al la laboristoj, ke sen la revolucia renverso al la kapitalismo, neniu arbitracia internacia tribunalo, neniu "demokrata" reorganizo de la Ligo de Nacioj povas savi la homaron de la imperiistaj militoj".

Kaj nun ? - Nun, la komunistaj, pli ĝuste la Stalinaj, gazetoj prezentas la aliĝon de Sovetio al la Ligo de Nacioj kiel "grandan venkon de l'proleta registaro" !! Ĉe tia cinike hipokrita aserto mi emus pensi, ke temas pri sonĝo... Tamen estas realaĵo. Legante la pledon de Bartu por akceptigi Sovetion en la Ĝenevan aeropagon, oni povas facile mezuri la grandan distancon, kiu disigas la Leninan politikon de la Stalina. Bartu interalie diris :

"Kun la kontrakto en la manoj, mi supreniras ĉi tiun tribunon, kun la kontrakto, kiu metis la unuajn fundamentojn de la Ligo de Nacioj. Ĝi estas mia gvidilo, mia atestanto, mia garantio."

Tio signifas, ke la Sovetia registaro akceptas tiun imperiisman, banditan,rabistan kontrakton. Kaj por tute konvinki siajn kolegojn, kiuj time ankoraŭ kredas, ke Moskvo ĉiam estas la ĉefa bastiono de l'mondrevolucio, li aldone citis frazon de Mirabo, tiu fama oratoro el la tempo de la franca Revolucio. Mirabo celis fariĝi ministro k tiucele iun tagon konfesis al sia amiko la grafo Lamark,

kiu estis lia perante ĉe la reĝa kortego :
"Jakobenoj fariĝintaj ministroj ne ĉiam estas jakobenaj ministroj".

Kia vangofrapo al Stalin ! Kia honto, ke Litvinov eĉ ne provis forviŝi tian klaran aludon pri perfido al la revoluciaj principoj !! Kia plej aŭtoritata atesto, ke Komintern ne plu timigas burĝajn registarojn !!! Klarige Bartu insistis :

"Mi pensas, ke ne necesus citi multajn faktojn, por demonstri, ke okazis evoluo en la sovetia Rusio k, ĉiaokaze, pri tiu evoluo mi havas pruvon k ateston hodiaŭ mem. Ĉu Rusio respondis al ni per malprecizaj paroloj k per nedifinitaj promesoj ? Se tiel estus, mi ne starus ĉe ĉi tiu tribuno por defendi la tezon pri akcepto. Sed mi vokas al viaj memoraĵoj, al via konscienco. Kvankam mi pensis, ke Rusio faros deklaron, kiu ebligos, ke oni akceptu ĝin, ĉu vi pensis, ke la deklaro estus tiom senkondiĉa, kiom ni ĝin ricevis ? Ĝi ja estas kategoria, absoluta, tiagrade, ke mi renkontas neniun el la oratoroj, kiujn ni ĵus aŭdis, por dubi pri la sincero de la deklaro de Rusio".

Tiajn parolojn de la franca ministro la komunistaj k socialistaj gazetoj ne raportis al siaj legantoj. Kaj per tia silento oni povas konstati, ke la partiaj gvidistoj tre bone komprenas la signifon de tiu granda aliiĝo en la politiko de Sovetio. Tian opini-ŝanĝaĉon ili provas dronigi en la entuziasmo, kaŭzita de la ekamikiĝo inter komunistoj k socialistoj. Sed kiu observas k pripensas, tiu ĉagrene ekvidas ke tiuj gvidistoj (mi substrekas tiun vorteron, por akcenti ke temas pri homoj, kiuj ĝenerale havas ĉefe kiel celon okupi postenon, stari ĉe la rando de la politika scenejo) pretiĝas oferi la vivon de milionoj da laboristoj sur la altaro de siaj respektivaj patrioj.

"Li estas tro pesimista, li troigas, lia fantazio vere hiperbolas...", vi sendube pensos. Mi tre deziras, ke vi estu pravaj; se mi eraras, neniu pli ol mi ĝojos pri tio. Sed bonvolu atenti k pripensi jenajn faktojn. Jam de kelka tempo en Sovetio mem estas entreprenita vasta agitado por encerbigi al la tiea popolo la patriotismon. Por pruvi mian aserton, mi citos al vi kelkajn

specimenajn pecojn de tiu propagando k la tutan tekston de dekreto alprenita la 8an de junio 1934. Legu atente k meditu : poste vi decidu ĉu mia pesimismo havas aŭ ne fundamenton :

"P O R  L A  P A T R I O"

"Por la Patrio ! Ĉi tiu vorto ekbruligas la flamon de la heroeco, la flamon de l'krea iniciativo sur ĉiuj kampoj de nia vivo tiom riĉa k dieca. Por la patrio ! Tiu vorto entuziasmigas dekojn da milionoj da laboristoj por la defendo de ilia nobla patrio k igas ilin pretaj por ĉia ofero. La defendo de l'patrio ! Ĝi estas la superega leĝo de l'vivo. Kaj kiuj levas la manon kontraŭ la patrion, kiuj perfidas ĝin, tiuj devas esti ekstermataj.........
...La popolo el 170 milionoj da laboristoj, por kiuj la naskiĝa grundo estas la patrino-patrio, kiu nutras per sia sango la glorajn ĝermojn de nova k feliĉa vivo, senmanke k severege punos la patri-perfidulojn. POR LA PATRIO, POR ĜIA HONORO K ĜIA GLORO, POR ĜIA FORTO K PROGRESO !"

Tiu cito estas prenita el la "Pravda", n-ro de la 9a de junio 1934. Kaj ne nur la Pravda sed ĉiuj aliaj gazetoj el Sovetio entreprenis tiun porpatrian predikadon. Sed prefere mi tuj konigu la tutan tekston de dekreto, kies supre cititaj frazoj konsistigas nur ties komenton :

"DEKRETO DE L'CENTRA PLENUM-KOMITATO DE L'SOVETOJ

- Kompletigi la leĝon rilatan al la krimoj kontraŭ la ŝtato per kvar paragrafoj, koncernantaj la perfidon al la patrio.

1) Ĉiu agado farita de Sovetiaj civitanoj kontraŭ la militistan potencon de USSR, ĝian sendependecon aŭ la tuton de ĝia teritorio, kiel, ekzemple, la spionado, la diskonigo de ŝtataj aŭ militistaj sekretoj, la dizerto, la transiro de la limo aŭ aeroplana forkuro eksterlanden, estas punata per morto kun konfisko de ĉiuj havaĵoj. En okazo de malpligravigaj cirkonstancoj la mortpuno estas aliigata je 10 jaroj da malliberiĝo kun konfisko de ĉiuj havaĵoj.

2) Koncerne la militistojn, nenia malgraviga cirkonstanco estas akceptebla k la samaj punindaj faroj sekvigas mortpunon kun havaĵ-konfisko.

3)En la okazo de limtransiro aŭ de forkuro eksterlanden per aeroplano, la plenrajtaĝaj (dekokjaruloj - E.L.) familianoj de l'militisto, se iel ajn ili helpis tiun perfidon, aŭ se ili sciis pri ĝi k ne denuncis ĝin al la estraro, estas punataj per 5 ĝis 10 jaroj da malliberiĝo kun havaĵ-konfisko.

La plenrajtaĝaj familianoj de l'perfidulo, ĉu vivantaj kun li, ĉu estantaj sub lia prizorgado ĉe la momento de l'perfido, estas senigitaj je voĉdonrajtoj k ekzile sendotaj por 5 jaroj en malproksimajn regionojn de Siberio.

5)La nedenunco kontraŭ militisto koncerne perfidon, ĉu en preparo, ĉu jam farita, sekvigas punon je 10 jaroj de malliberiĝo.

Por la civiluloj la sama delikto estas punata laŭ la paragrafo 12a de la leĝo pri la krimoj kontraŭ la ŝtaton.

(La 8an de junio 1934. La Prezidanto de l'Centra Plenum-Komitato : Kalinin. Por la Sekretario de l'Centra Plenum-Komitato : Medviejev.)"

Tiu dokumento ne bezonas komentojn por ke ĉiu memstare pensanta homo komprenu ties gravon k ĝustan signifon. Mi tamen volas almenaŭ substreki, ke en la lando, kie laŭdire oni konstruas socialismon, eĉ civiluloj estas mortpunataj simple pro forkuro eksterlanden ! Hitler k Musolini ne ankoraŭ atingis tian gradon de barbareco. Kaj ĉu do ne estas monstraĵo, ke familianoj de forkurinto povas esti punataj pro "krimo", kiun ili mem ne faris ? (pri tiu leĝo, legi rimarkon 3, pĝ. 26 , la mencion de konkreta ekzemplo).

Paralele al tiu porpatria prizorgado sovetia, en la francaj komunistaj gazetoj estis rimarkebla lastatempe nova sinteno rilate al la nacio. Sendube la lakeaj redaktoroj ricevis ordonon ne tro rapidi en tiun novan direkton, por ke la kontrasto ne estu tro facile rimarkebla de la legantoj. Tamen atentema persono povis vidi la ŝanĝon. En "La Homaro" ekzemple, mi legis jenon :

"Ni amas k defendas Francion k ĝuste pro tio ni kontraŭbatalas la kapitalismon". Ĉu ne estas videbla la intenco krei konfuzon en la cerbo de la legantoj k iom post iom kutimigi ilin al la ideo akcepti militon, kiun partoprenos mem Sovetio aliance kun Francio ? Tiam la "komunistoj"

emfazos, ke temas defendi la civilizon kontraŭ la Hitlera barbareco ktp... Tute same kiel en 1914 ! Tiam la t.n. revoluciaj gvidistoj rekomendis partopreni la militon por defendi la demokration kontraŭ la germana imperiismo. Pro tia sinteno Lenin k la tiamaj bolŝevikoj tute prave nomis la gvidistojn de la II-a Internacio perfiduloj. Sed nun la gvidistoj de la II-a k III-a Internacioj pretiĝas same perfidi la verajn interesojn de l'Proletaro. Por mi, tio estas tute klara, k granda estas mia ĉagreno ĉe la konstato, ke la simplaj laboristoj ne ekvidas tian prepariĝantan perfidon.

Sed malgraŭ ĉio vi tamen eble pensos, ke mi ne estas prava samigante la diktatorecon de Stalin kun tiuj de Musolini k de Hitler. Vi opinias ankoraŭ, ke en Sovetio regas la laboristoj k la kamparanoj. Tiu regado cetere estas simboligata per la ĉie videblaj martelo k falĉileto. Por kredemuloj tiu simbolo estas sendube pruvo pri ekzisto de laborist-kamparana regado...

En Francio la devizo "Libero - Egalo - Frateco" kuŝas sur la fronto de ĉiuj oficialaj konstruoj kiel atesto pri la principoj, kiuj gvidas la respublikan regadon. Kaj certe la francaj revoluciuloj el la jaroj 1789-93 batalis por ke efektiviĝu tiu ilia idealo. Ne necesas insisti pri tio, ĉu ne ? Vi certe jam delonge scias, ke en Francio la bela devizo de la unuaj respublikanoj estas nur trompaj, senenhavaj vortoj.

Estas vere miriga k ploriga la konstato, ke ĝenerale la homoj facile estas blufe mistifikataj per vortoj, simboloj k devizoj. Ekzemple, milionoj k milionoj da katolikoj kredas, ke la papo reprezentas Jesuon sur la tero; tamen ĉiuj bone scias, ke la "filo de Dio" vivis simple, modeste k kondamnis la riĉulojn. Malgraŭ tio la kreduloj volonte konsentas, ke la ekleziestro, kardinaloj k aliaj "princoj" de la eklezio vivu lukse k tute malmodeste.

Certe la rusa Revolucio el la unuaj jaroj metis la regadon en la manojn de la laboristoj k kamparanoj; ĝi sendube celis la forigon de la klasoj k la starigon de l' socialismo. Sed necesas esti blinda aŭ fermi la okulojn por ne vidi, ke jam de kelkaj jaroj pli k pli kreiĝas ia nova aristokrataro, ke regas ia nova pastraro, kiu faris el la marks-leninismo dogmon, novan religion. Ĉu do,

ekzemple, ne estas tre karakteriza la fakto, ke tiu nova formiĝanta klaso havas en sia ekskluziva dispono specialajn magazenojn, kiuj estas relative bone provizumataj, dum mankas preskaŭ ĉio en la aliaj ? Kaj ĉu do la ekzisto de grandega diferenco inter la salajroj (de 60-70 ĝis 1500-2000 rubloj monate °/) ne estas okulfrapa pruvo, ke la tiea reĝimo havas nenion komunan kun vera socialismo ? Necesas posedi grandan dozon da naivo por samigi industriigon °°/ kun socialismo. Estas ja vere ke en Sovetio la fabrikoj k ĉio apartenas al la Ŝtato, sed tio neniel signifas, ke reale, fakte la laboristoj povas disponi je la produkto de sia laboro. La plusvaluto anstataŭ iri en la poŝojn de kapitalistoj, servas por vivteni grandnombran burokrataron k pagi altajn salajrojn al iu kategorio de homoj. Kaj la "komunistaj" moŝtoj, kiuj havas en sia dispono luksan aŭtomobilon ĝuas ties komforton k oportunon tute same kiel se ĝi apartenus al ili. Diru al mi, kiel, ekzemple, Lunaĉarski povis dum longa tempo ripozi en aristokrata banurbo el suda Francio ? Kaj kiam li tie mortis, kial lia kadavro povis esti transportata al Moskvo ? Saman demandon ni faras pri la ambasadoro Dovgalevski, kiu antaŭ ne tre longe mortis en Parizo k kies kadavro ankaŭ estis en granda pompo ekspedata al Moskvo. Ĉu tiuj faktoj ne klare montras, ke la sovetiaj moŝtoj apartenas al iu speciala klaso de homoj ? Kaj mi ĉiam pensis ke la socialismo celis malaperigi la klasojn !.. Sed eble la laboristoj, kiuj duonmalsatas en Sovetio, devas esti kontentaj k eĉ fieraj pro tio, ke siajn ekspluatantojn ili nomas "Kamarado" ! Kompreneble, povas okazi, ke ial kamarada moŝto perdas la bonan postenon k refalas en preskaŭ proletan situacion. Sed ankaŭ en kapitalisma regsistemo okazas nemalofte, ke ekspluatanto bankrotas,

---------

°/Kelkfoje oni legas en kom. gazeto ke la salajroj estas pliialtigataj, sed la trompistoj ne diras, ke dume la aĉetpovo de l'rublo paralele plimalaltiĝas !

°°/La elsekigo de la Pontinaj marĉoj fare de la itala faŝismo ankaŭ estas tre grandioza laboro; la samon oni povas diri pri la elsekigo de la Zuiderzee fare de la Nederlanda registaro. Kaj oni nur pensu pri la cent-etaĝaj domoj en Usono !!!!

ke milionulo malriĉiĝas. Neniu reĝimo donas absolutan sekuron al privilegiitoj.

Laŭ mia ĉiama kompreno, la socialismo estas reĝimo en kiu fakte regus libero, egalo (aŭ ekvivalento) k frateco. Ĉu tiel estas en Sovetio ? Ne ! tiel ne estas k la tuta propagando de la Stalina burokrataro estas nur giganta blufo, grandega trompo. Mi asertas, ke ne ekzistas esenca diferenco inter la diktatorecoj nun regantaj en Sovetio, Italio, Germanio k alie. Oni tamen ne povas tute samigi ilin. Ankaŭ ekzistas diferenco inter la diktatoreco de Musolini k tiu de Hitler. Pro tio mi substrekis la vorton "esenca". Kio rajtigas min diri ke la reĝimoj nun regantaj en diktatorecaj landoj estas esence la samaj, tio estas jenaj konsideroj :

1) Nur unu sola partio tie povas ekzisti k ĝi regas laŭ absolutisma maniero,
2) Unu sola homo regas absolute super tiu partio,
3) Forestas ĉia libero pri pensesprimo k kunvenrajto,
4) Ĉiuj kontraŭuloj de l'diktatoro estas malliberigataj, ekzilataj aŭ mortigataj,
5) La sindikatoj k kooperativoj perdis sian sendependecon k fariĝis kvazaŭ ŝtataparatoj,
6) La infanoj estas devige edukataj laŭ la ŝtata dogmo,
7) La militismo estas freneze disvolvata, kvankam la diktatoroj ne malofte deklaras, ke ili deziras pacon.

Mi povus verki dikan libron per la amaso da materialo, pruvanta ke la Stalina diktatoreco estas unu el la plej abomenindaj k danĝeraj. Ĝi ja estas aparte danĝera, tial ke ĝi hipokrite prezentiĝas kun ruĝa masko. Nur kelkaj faktoj estu ĉi tie menciataj. Laŭ plej fidindaj raportoj de socialistoj, de neortodoksaj bolŝevikoj k de anarkistoj, estas en Sovetio almenaŭ 5 milionoj da malliberigitoj aŭ punekzilitoj. El inter la herezaj komunistoj malliberigitaj mi citas nur la nomon de Razianov, la fondinto de la komunista Akademio k de la Instituto Marks-Engels en Moskvo, k tiun de Viktoro Serge, verkisto kun kiu mi povis persone konatiĝi en Vieno dum la jaro 1925. Tiam li estis la direktoro de la franclingva eldono de Internacia Korespondado, semajna organo de Komintern. Kaj vi certe memoras, ke Trocki havis la bonŝancon esti forpelata eksterlanden; sed bonvolu ne forgesi, ke proksimume 5 000 Trockianoj sidas en la Stalinaj malliberejoj.

Por resti en nia esperantista sfero, mi estus al vi tre danka, se vi povus akiri sciigon pri Kdo Futerfas, kies portreton vi povas trovi en la decembra numero (1922) de Sennacieca Revuo. Li estis - verŝajne ankoraŭ estas, se li vivas - anarkisto. Jam de la jaro 1924, mi vane provis ekscii ion pri li. Sed eble vi opinios, ke anarkisto estas homo pri kies sorto vi ne volas elspezi poŝtmarkojn en korespondado kun Sovetianoj!! Se vi volas interesiĝi nur pri sampartianoj, tiam demandu pri la sorto de M. Krjukov, la malnova bolŝeviko, kiu kuraĝis en 1930 malkaŝe diri sian opinion pri la fripona agado de SEU kontraŭ SAT. Jam de pli ol tri jaroj, mi sensukcese provis ricevi vorton de li aŭ iun informon pri li. Demandu pri Kdoj Beŝkarev, Djatlov, k.a. kiuj pli malpli kaŝe kuraĝis kontraŭstari al S-ro Drezen, la lakea respondeculo antaŭ Stalin pri la esperanto-movado en Sovetio...

Responde al Kdo Lempert, mi diris, en Absolutismo, ke mi konas intime personojn, kiuj longe restadis en Sovetio k tute seniluziiĝis pri la tiea reĝimo. Unu el ili restis tie dum 10 jaroj, okupis diversajn respondecajn postenojn en la industrio k pro tio iel apartenis al la kategorio de privilegiitaj personoj. Malgraŭ tio li tamen ne povis elteni pli longe, perdinte la esperon, ke pliboniĝos la situacio. Cetere li paciencis tiom longe, tial ke li ne volis forlasi sian edzinon, al kiu la ŝtato ne permesis eksterlandiĝi, ĉar ŝi estas rusino. Nur kiam la diplomatiaj rilatoj inter Francio k Sovetio fariĝis amikecaj, li tiam sukcesis atingi, ke lia edzino akompanu lin. Jam de 10 monatoj li do estas denove en Francio. El la detala raporto, kiun mi aŭdis el lia buŝo, mi citos al vi nur malmulton. Miaopinie tio sufiĉos por ke vi povu akiri iom da kompreno pri la ĝusta situacio en "la lando regata de laboristoj". Vi eble memoras, ke antaŭ 2 jaroj sin mortigis la edzino de Stalin. Kiel kompartiano mia amiko devis deĵori ĉe la enterigo k iel ludi policistan rolon. Mi lasu al li la parolon :
"G.P.U. (Politika Ŝtata Direkcio) atingis sub la Stalina reĝimo nekredeblan malvolviĝon. Ĝi fariĝis grandega administracio, disponanta, krom siaj propraj anoj, la tutan milicon de la lando, centon da malliberejoj aŭ

ekzilejoj k organizanta la vivon k laboron de cent miloj da punitoj, kiujn, plejparte, ĝi ekspluatas mem en fabrikoj k grandaj laborejoj. Koncerne la nombron de ĝiaj propraj soldatoj, oni juĝu pri ilia gravo : la speciala armeo de G.P.U. konsistas el 100 mil militistoj, zorge elektitaj, bone nutrataj, severe k laŭcele edukataj. Tiu armeo estas modelo el sia speco, kiel rilate al disciplino k servemo, tiel rilate al la ekstera aspekto. Okaze de la enterigo de la edzino de Stalin, mi memoras pri la impona spektaklo, kiun prezentis la gvardio de l'diktatoro laŭ la vojo al la tombejo. Du vicoj da oficiroj el G.P.U. rajdantaj sur la plej belaj ĉevaloj, poste vico da lernantoj de la speciala lernejo por oficiroj de G.P.U. k fine la milico, kiu fortenis la popolamason. Bonvolu noti ke Stalin tre zorge evitas kontakti kun la publiko k, timante atencon, oni estis forpelinta la homojn de sur la trotuaro laŭ la tuta irdistanco, eĉ en la mallarĝa strato Volondka. Interne de la domoj, G.P.U.anoj prizorgis, ke ĉiuj alstrataj fenestroj restu nepre fermaj. La procesio konsistis ekskluzive, krom el la oficialuloj, el la plej fidelaj k servemaj kompartianoj el Moskvo. Por ke vi havu klaran bildon pri la antaŭzorgoj, mi aldonu, ke en ĉiu okopa vico de la irantaro, la unua k la oka vicano estis antaŭe elektitaj k havis kiel taskon malebligi la enpenetron de personoj fremdaj al la procesio".

Mi rimarkigis al mia amiko, ke laŭ francaj gazetoj ŝajnas, ke antaŭ kelkaj monatoj G.P.U. estis reorganizata. Tiam kun melankolia rideto li respondis :

"Kiel vi, mi legis pri la afero k eĉ tre detale en rusaj gazetoj, kiujn mi ricevas. Fakte nur la nomo estas ŝanĝita. La nova <u>Komisario por internaj aferoj</u>, kies ĉefkomisaro estas Jakoda, la eksestro de G.P.U., konservas ĉiujn funkciojn k taskojn de ĉi tiu lasta. Ne gravas la titolo : estonte kiel estinte tiu polica aparato rajtos malliberigi k ekzili sen antaŭa publika juĝo, plenumi politikan spionadon, cenzuri poŝtaĵojn ktp. Kelkrilate la nova organizo eĉ estos pli timinda ol la antaŭa, sed ĝi almenaŭ havas la avantaĝon ĵeti polvon en la okulojn de la eksterlanda publiko, kiu kredos ke Sovetio

iom demokratiĝis, ĉar G.P.U. malaperis. Estos tiel pli facile al Litvinov pledi por la akcepto de U.S.S.R. en la Ligon de Nacioj..."

El tiu atesto de kompetenta persono min ĉefe impresas la fakto, ke Stalin havas tute la saman potencon, kiel antaŭe havis la caroj, ĉar por la enterigo de sia edzino li povas okazigi tian grandegan, pompan manifestacion funebran. Same ankaŭ kiel caro li timas atencon k ŝirmas sin per polica aparato. La cara ŝtato estas tute simila. Mi ne diras "sama"; ekzistas ja diferencoj; la klasiĝa procezo, t.e. la formiĝo de klasoj (°) ne ankoraŭ atingis sian definitivan formon k la nuna regantaro ne povas esti komparata kun la cara aristokrataro. Cetere en niaj demokrataj landoj ankaŭ la burĝaro ne estas komparebla kun la malnova aristokrataro. Kia estis la ĉefa karakterizo de la cara socia sistemo ? Ĝi estis la servuto. La Stalina tute similas al servuto : kamparanoj devas servi en kolĥozoj k laboristoj en fabrikoj. Ili ne rajtas foriri sen permeso k devas havi pasporton por ŝanĝi laborlokon. Jes!!.. la enlanda pasporto, kiel ĝi ekzistis dum la cara tempo, estas restarigita antaŭ proksimume du jaroj... Sed ĉio tio okazas sub la signo de martelo k

-------

(°)Nuntempe oni povas larĝtrajte diri, ke ekzistas kvin klasoj:
1)La ĉefaj gvidantoj de l'Partio; la altrangaj funkciuloj; la superaj estroj de la armeo k de G.P.U.; kelkaj famaj verkistoj.
2)La inĝenieroj, teknikistoj k.a. diversspecaj intelektuloj,
3)La laborinstigistoj (udarnikoj); la subrangaj anoj de l'Partio k de G.P.U.
4)La granda amaso de laboristoj k kamparanoj, kies vivkondiĉoj estas pli malbonaj ol tiuj de senlaboruloj en kelkaj kapitalistaj landoj.
5)La parioj t.e. la ekzilitoj, eksigitoj, suspektitoj k ĉiaspecaj herezuloj.

Ĉar vi sendube estas ankoraŭ sub la influo de la lerte organizita blufo de la Stalina propagand-aparato, vi verŝajne emos kredi, ke miaj klarigoj pri klasoj estas subjektivaj. Mi petas ke vi bonvolu esplori, kontroli k poste mediti nur pri jena fakto, kiu miaopinie estas tre

falĉileto k por naivaj homoj tio sendube estas sufiĉa pruvo, ke en Sovetio stariĝas socialismo. Plorinde !... La Stalina "socialismo" fakte estas novspeca sklaveco k tian mi ne volas. Liberon k homan dignon mi alsopiras k tio en Sovetio absolute mankas...

Ĉi tiu letero jam fariĝis longa, kvankam mi ne diris ĉion dirindan, ĉion, kio povus tute malfermi viajn okulojn k forviŝi la densan, grandegan blufon tre lerte aranĝitan de la Stalina burokrataro, de la nun formiĝanta nova privilegiita klaso. Sed mi devas rezigne limigi min.

Tamen mi ne volas fini, ne respondante al K-ino M.A., kiu demandas, ĉu fakte ne ekzistas signoj pri malapero de naciecaj diferencoj. Se oni staras ĉe scienca k teknika vidpunkto, estas evidente, ke naciecaj problemoj pli k pli tendencas malaperi. Ŝipoj, aŭtomobiloj, kanonoj ktp.., laŭforme pli k pli samiĝas en la tuta mondo. La disvastiĝo de la verkoj de Marks, Engels k.a. en ĉiuj landoj ankaŭ povas esti konsiderata kiel ia signo pri unueciĝo de l'penso. Sed tiel ne prezentiĝas konkrete la problemo. Mi skribis :
"...ĉie la naciismo estas la plej potenca, la plej instige minaca ideo-forto, movanta la amasojn. Vidiĝas nenia signo pri kunfandiĝo de malsamlingvaj nacioj en pli grandan unuon, sed male ĉie oni rimarkas tendencojn k agitadon por nacia apartiĝo k sendependiĝo..."

Ĉu tio, kion mi asertis estas fakto aŭ iluzio ? Por respondi, laŭ mi, sufiĉas memori pri la sangaj bataloj, okazintaj en Irlando; pri la Gandhia movado en Hindio; pri la tuta agitado en Ĉinio; pri la nuna baraktado en Katalunio k Baskio. Kaj eĉ en Francio, kiu estas unu el la landoj, kie la provincoj plej funde kunfandiĝis, oni povas vidi ekde kelkaj jaroj movadon por la sendependigo de Bretonio !... Kaj ĉu do ne estas la naciismo, kiu konsistigas la ideologian bazon sur kiu konstruis Masarik, Pilsulski, Mustafa-Kemal, Musolini, Hitler k.a.

-------

signifoplena : post 35-40 jaroj da laborado en fabrikoj, se laboristo fariĝas invalido, li ricevas pensie po 30-35 rubloj monate, sed vidvinoj aŭ parencoj de altranguloj ricevas po 350-750 rubloj monate, plus diversajn aliajn privilegiojn...

"herooj" ? Kaj ĉu do la dokumento, kiun mi konigas al vi pli supre, ne montras klare, ke eĉ Stalin nun utiligas la naciismon por firmigi sian ruĝan tronon ? Necesas fermi la okulojn, por ne vidi la naciismajn ondojn, kiuj minacas ĉiuflanke la homaron. Jes ja, la patriotismo estas la plej forta religio, movanta en nia epoko la amasojn. Ŝajnas al mi, ke Marks ne antaŭvidis tion. Li subtaksis la forton de ideoj, la mistikemon, kiu ĝenerale superregas la racion en la cerbo de homoj, eĉ de tiuj, kiuj tamen kredas esti senigitaj je antaŭjuĝoj. La maŭzoleo por la kadavro de Lenin en Moskvo pruvas tion tre bone.

Ne kredu tamen, ke mi havas la opinion, ke Marks ne estis grandcerba homo. La aŭtoro de l' "Kapitalo" certe meritas ĉies admiron. Sed mi emas pensi, ke Marks mem hontus pri siaj nuntempaj disĉiploj, kiuj tro laŭlitere komprenas k instruas lian doktrinon. Li certe tre ĉagreniĝus ĉe la konstato, ke la marksismo fariĝis nediskutebla dogmo, devigo instruata al 160 milionoj da homoj sur unu sesono de l'mondo.

Ho! mi bone komprenas, ke miaj pesimismaj diroj en ABSOLUTISMO povas fari malbonan impreson ĉe multaj legantoj. Se mi celus akiri popularon, aliel mi certe parolus. Por veki aplaŭdojn ĉe la amaso, necesas doni al ĝi esperojn, baldaŭ efektiviĝontajn, flati ĝin k fari mirindajn promesojn. La pastroj promesas eternan feliĉon al la piuloj; la politikaj agitistoj promesas paradizon sur la tero, se oni donas al ili la regadon. Mi volas esti nek pastro, nek agitisto. Mi bone konscias, ke la sennaciismo estas utopio en la nuna tempo, sed mi havas la firman konvinkon, ke civilizo pereos, se la popoloj el la tuta tero ne unuiĝos k kunfandiĝos. *La ĝenerala aplikado de esperanto povus tre efike helpi al tiu kunfandiĝo*; pro tio mi estas SAT-ano k tre ĉagreniĝas ĉe konstato, ke ĝenerale la t.n. revoluciuloj restas ligitaj al tradicioj k rutinaj kutimoj k malatentas nian movadon...

La nuna mondo prezentiĝas al mi kiel amaso da homoj, naĝantaj kontraŭflue en riverego. Nur malmultaj lasas sin porti de la fluo, sed estas malhelpataj de la baraktado de la plimultaj. Tamen la fluo nevenkeble portas

ĉiujn al la oceano, kie ĉiuj akvoj miksiĝas. Ĉu estas saĝe naĝi kontraŭdirekte al la fluo, kiel ĉiaspecaj naciistoj ?...

Eble mi nur sukcesis tedi vin per mia longa babilado. Tiaokaze bonvolu pardoni min k akcepti mian fratecan k sennaciecan saluton.

P.S. Mi volas kompletigi tiun ĉi leteron per mencio de kelkaj faktoj, kiuj estas ankaŭ tre signifaj :

1) Komence de aŭgusto 1934 alvenis en Romon aernavigada misio sovetia por redoni la viziton, kiun faris al Moskvo la faŝista marŝalo Balbo. La sovetiaj aviadistoj estis akceptataj je la sonoj de la Internacio (!!!), de Giovinezza, la faŝista kanto, k de la reĝa himno...

2) Antaŭnelonge la faŝista generalo Graziolo k.a. italaj militistoj estis akceptataj en Moskvo k Minsko je la sonoj de la itala himno k de la Internacio. La stacidomoj estis abunde ornamataj de italaj flagoj k de sovetiaj, kompreneble kun la martelo k la falĉileto (!!!). Graziolo povis ĉeesti la grandajn manovrojn de la t.n. ruĝa armeo k laŭ lia raporto en la "Giornale d'Italia", la itala misio estis tute speciale bonvenigata.

3) Por ke la legantoj povu prijuĝi la leĝon, kies teksto troviĝas pĝ.16, laŭ ĝia apliko, ni menciu jenan konkretan ekzemplon :

Okaze de antaŭnelonga vizito de sovetia ŝiparo en la pola haveno Gdjnia, la maristo VORONKOV el la kiras-ŝipo "Marat" dizertis. Sekve de tio la militista juĝistaro mortkondamnis lin k ordonis la tujan areston de liaj parencoj, kiuj estas malliberigataj dum 10 jaroj kiel garantiuloj. La motivo de tiu ordono estas laŭvorte jena : "pro ebla kunkulpeco eĉ pasiva aŭ senkonscia".

La ŝipano VORONKOV ne povas esti mortpafata, ĉar li forkuris; dume liaj parencoj sidas en malliberejo k sendube meditas pri la plej bona maniero konstrui socialismon en unu sola lando.

4) Moskvo, la 5an de novembro 1934. - La supera tribunalo verdiktis en la proceso rilata al la fervojakcidento, okazinta ĉe la stacio Osnava. La tri akuzitoj estas konsiderataj kiel kulpaj pro (laŭvorte) "krima maldiligento

en la deĵoro". La ĉefoficisto Linnik estas punata per mortpafado k la du aliaj akuzitoj : la signalisto Junnoĉef je kvin jaroj da malliberiĝo k la relŝanĝisto Pavlenko je tri jaroj.

Tiu fakto ne estas unika; mi povus mencii aliajn, similajn. Kaj nun mi demandas al la blindaj kreduloj, kiuj atendas la lumon el Moskvo, en kiu alia lando, el inter la plej reakciaj, laboristoj estas mortpafataj pro "maldiligento en la deĵoro" ?

o o o

Bonvolu tamen, mi petas, ne konkludi el ĉio dirita, ke mi kontraŭas al ĉia diktaturo. Dum furiozas la batalo inter ekspluatistoj k ekspluatatoj, estus ja stulte paroli pri libero k demokratio. Sed diktaturo devas daŭri mallonge k ne aliiĝi en diktatorecon de persono. Mi faras diferencon inter proleta diktaturo mallongdaŭra k la pli k pli rigora k subprema diktatoreco Stalina, kiu kondukas al restariĝo de kastoj.

E. L.

# Polemiko pri Sennaciismo

Noto de la kompilinto : Jena teksto estis grandskale disvastigita per la esperantlingva gazeto "Popola Fronto" (15an de ~~julio~~ 1937), kiu aperis dum la hispana milito:

.................................................................

Vortoj al kamarado LANTI :

P U B L I K A   L E T E R O

pri

S E N N A C I I S M O

(verkita de kdo Vilh. BOSK, SAT-ano 19317)

Antaŭ kelkaj monatoj vizitis Valencion kdo Lanti, ekmigranta tra la mondo. Kun lia afabla permeso, eĉ kun lia instigo, mi promesis skribi artikolon en "HEREZULO" por esprimi mian malkonsenton al liaj laboro k sinteno, rilate al la rolo de la sennaciistoj k de ties presorgano. Intertempe militistar-klerikala ribelaĉo eksplodis en Hispanio k mi devis zorgi pri alia pli urĝa tasko. Ankaŭ "Herezulo" malaperis. Prokrastinte la verkadon de tiu ĉi letero, mi fine sendas ĝin al SAT kun peto bonvole enpresigi ĝin en "Sennaciulo". V.B.

Jam delonge, post mia aliĝo al la Sennaciista Frakcio, al kio pelis min la legado de la MANIFESTO en la jaro 1934, mi sentis la bezonon eksterigi mian malaprobon, ne al la doktrino, kiun principe mi senhezite apogas, sed al la metodoj de ĝia ĉefa pioniro, kamarado Lanti.

Per tiu ĉi letero mi intencas pruvi, ke la teorio pravas sed la procedoj uzataj de tiu kamarado estas kontraŭefikaj k sekve damaĝaj por la afero.

Laŭ la koncernaj fundamentaj tekstoj, la sennaciisma vidpunkto "estas nuntempe utopia" dum la internaciisma vidpunkto (tiu pri la rajto al plena memdispono de ĉiu nacio) estas la sole aplikebla en la nuntempaj kondiĉoj.

En tiuj deklaroj estas agnoskite, ke la mondo nepre devas travivi "internaciecan" stadion. Tio signifas do, ke internaciismo tute ne estas baro sed ŝtupo al la sennaciisma estonta socio, nuntempe efektivigebla. Kial do, ni aprobu la konstantajn atakojn de k-do Lanti al la internaciistoj ? Miaopinie, internaciismo estas la grundo, kie ni devas semi senlace sed ne sarkasme, ne per primokoj k per dubasencaj ironioj. Estas ĉe la internaciistoj, kie troviĝas la plej antaŭenemaj personoj, varbeblaj por nia celo. Satiroj tiuokaze ne taŭgas por logi ilin al nia tendaro.

HEREZULO deklaris, ke ĝi kondamnas nenian sincerulon. Sed la faktoj ja pruvas, ke en ĝia kolekto amasiĝas atakoj dekstren k maldekstren, kontraŭ komunistoj, kontraŭ socialistoj, kontraŭ internaciistoj, kontraŭ vivantoj k kontraŭ mortintoj. Evidente, la redaktoro trovis ĝis nun nenian sincerulon. Ĉu tio ĉi ne ŝajnas sektemo ?

Malakceptinte ĉiujn dogmojn, k-do Lanti mem kreis novan dogmon el sia maltolerema "ismo". Kun ĉagreno mi skribas tion ĉi, ĉar mi timas esti ekskomunikata, kiel "hereza" sennaciisto. Sed mi ne estas ortodoksa ĝis tia grado, ke mi silentu, kiam mi konsideras, ke la taktiko de k-do Lanti (kiun cetere, mi persone tre sincere estimas) estas malĝusta. Efektive, oni povas konstati, ke liaj malutilaj procedoj okazigas, rilate al Sennaciismo, miskomprenon k eĉ malŝaton flanke de kamaradoj, simpatiantaj ideale al la afero sed ne kapablaj juĝi aparte "sennaciismon", sendepende de la agado de iu ajn sennaciisto. Multaj ne bone vidas, ke sennaciismo, samkiel Esperanto, estas nenies propraĵo, sed konscie aŭ ne, ĉies celo ĉe la progresemuloj. Tial oni povas tro facilanime, identigi la doktrinon kun unu persono.

K-do Lanti, kiu tiel ofte alvokas la racion, sin montras tiurilate tro pasia k bedaŭrinde, laŭ mia penso, faras tute negativan laboron por la sukceso de Sennaciismo. Racia, normala homo, konsideras Internaciismon, kiel paŝon al iama Sennaciismo, sed kamarado Lanti traktas la interna-

ciistojn kiel malamikojn de la homaro. Se oni kredas je la leĝoj de la evoluo, oni konfesos, ke Sennaciismo en la praktiko nur povas esti natura logika sekvo de maturiĝinta Internaciismo.

Imagu ekzemple, ke por propagandi Esperanton, ni dediĉus niajn fortojn insulti la eventualajn lernontojn, dirante al ili, ke ilia patrolanda lingvo estas ĵargono, dum Esperanto estas la sola lingvo belsona k taŭga, kiu nepre devos forigi ĉiujn "naciajn lingvaĉojn". Kioman elcenton ni sukcesus varbi inter la alparolatoj ? Ni, sennaciistoj, celas la starigon de unu sola lingvo tutmonda, sed tian propagandon ni nur povas fari inter tiuj, kiuj jam estas konsciaj Esp-istoj k al tiuj internaciistoj kun supernacieca spirito. Al la laikoj ni simple diras, ke Esperanto estas helpa lingvo. Tion postulas la bona taktiko, mi pensas.

"Ili - la sennaciistoj - (asertas la Manifesto) tamen ne kredas, ke ĉiuj homoj povos baldaŭ akiri menson, en kiu superregus la racio. Ili scias, ke la sento estas granda forto, tre efika instigilo; ke la mitoj ludas gravan rolon en la Historio". Jen frazoj, kiuj pravigas mian tezon pri la taktiko ĝusta, konsistanta en tio, atenti zorge la menson de la homoj, por ne fuŝi la aferon mem, kiun ni volas defendi. Se anstataŭ prezenti Sennaciismon kiel aspiron, kiun la homaro post la necesaj etapoj realigos, ni prezentas ĝin kiel "absolutisman" idealon, tuj aplikebla por solvi ĉion malgraŭ la "nuntempaj kondiĉoj" k en opozicio al la, hodiaŭ ebla, Internaciismo, kiu estas pli facile komprenebla de la malkleraj amasoj, ni neniel sukcesos akceptigi ĝin grandskale k ĝi fariĝas stranga teorio.

Ne estas necesa troa cerbumado por kompreni, ke Sennaciisma socio nur povos eliĝi siatempe el longedaŭra kunvivado paca de memstaraj nacioj, internaciece regataj. Alimaniere, ĝi ne estus naskita de normala akuŝo, sed nevivpova monstro eligata per aborto. Praktika laboro estas do, helpi al la disvolviĝo de forta sento de internaciisma solidaro k kunlaboro inter la ŝtatoj k inter la popoloj, kiuj dume konservu daŭre siajn ecojn k apartajn karakterojn, ĝis kiam pli favoraj kondiĉoj ebligos, ke nia semado fruktiĝu.

Se Internaciismo estas rimado k Sennaciismo estas celo - tiel mi vidas la aferon - nia devizo estu : "Al Sennaciismo PER (ne kontraŭ) Internaciismo".

Ĉio alia, mi kredas, estas "diletantismo" k vana pretendo konstrui kastelon sur la sablo.

°°°

Ni ne povas ne aludi aspekton de la agado de kamarado Lanti per siaj eldonaĵoj. Tiun, kiu koncernas lian sintenon antaŭ la Soveta Registaro.

Post rekono de mankoj en tiu reĝimo - kvankam mi persone ne konsentas al ĉiuj kritikoj de kamarado Lanti - mi ne povas aprobi, ke la organo de la Frakcio havu preskaŭ ekskluzivan taskon, sisteme ataki la sovetan povon. Por tio ĉi mankis inter la gvidpunktoj de HEREZULO, unu tekstanta jene : "La precipa rolo de "H" estas ataki senĉese la agadon de la Sovetaj instancoj k persiste ignori la ekziston de la aŭtokratioj alilandaj". Ne gravas, ke HEREZULO ne plu estas eldonata. Mi deziras konstatigi, ke la revueto senlace agis tiel, malgraŭ ke simila gvidpunkto ne estis publikigita en ĝi. Pri la pretekstoj, per kiuj oni celis pravigi la "ne-sinokupadon" pri la faŝistaj ŝtatoj en la Sennaciista bulteno, mi preferas silenti.

Konstateble k konstatinde estas, ke k-do Lanti difinis al sia vivo tiun unuuran celon : batali kontraŭ la "ruĝa faŝismo" (esprimo fervore elpensita de li) k forlasi ĉion, kio rilatas al la faŝismoj bruna, nigra k alikoloraj, kun kiuj li ne trovas esencan diferencon ĉe Sovetlando, eĉ se li iam diris, ke ne ĉiuj reĝimoj estas samaj. Ke li agu tiel per siaj paroladoj k verkoj, estas tute privata afero lia; sed ke la politiko de la frakcio estu persiste tia, tion mi, kiel sennaciisto, ne ŝatas. Laŭ mia opinio, la gazeto de Sennaciismo estu disvastigilo de nia doktrino, kleriga informilo objektiva k supertendenca, eksponilo de nia altcela teorio, propagandilo de nia idealo, neniam pamfleto.

De sennaciista vidpunkto, jen unu el la gravaj pekoj, kiun k-do Lanti riproĉas al la Soveta Registaro. Ĝi kreis potencan armeon ! Kiu ajn sagaca homo agnoskus sincere, ke

se Sovetio ne volis liveri sin sendefende al la avideco de la kapitalismaj ŝtatoj (jam intervenintaj malsukcese dum la civilmilito en Rusio) ĝi estis devigata organizi fortan militaparaton. Nuntempe la minacoj kreskis, pro la najbaraj impetegaj faŝismoj "ne ruĝaj". K-do Lanti, pli obstina ol sagaca observanto, ignoras, ke la faŝistaj potencoj armadas sin por satigi imperiismajn apetitojn, dum la Ruĝa Armeo havas nur elementan defendan rolon.

Ĉio ĉi estas evidenta. Kaj se la sovetaj aŭtoritatoj ŝajne ekspluatis la denaskan emon de la homoj al sia naskiĝloko, tiel profitante la forton de la sentoj por igi pli fortika la militpovon de la lando, tio pruvas simple, ke la sovetaj instancoj aplikis al sia logika celo tiun memstaran miton, "ludanta gravan rolon en la Historio", k kiu estas nepre atentinda fakto por kiu ajn entrepreno homa "en la nuntempaj kondiĉoj". Ili do agis saĝe k prudente.

Verŝajne k-do Lanti preferus, ke Sovetio "sennaciiĝu", sin liverante senarme al Hitler k al Japanio. Sed tiun sennaciismon (mondunuigo sub tutmonda kapitalisma regno) mi ne ŝatas, k kredeble ankaŭ ne la plejmulto el la frakcianoj.

Kiam oni proklamas - kiel faris k-do Lanti - ke konstrui Socialismon en unu sola lando estas neeble, ankaŭ oni devas akcepti, ke enradiki Sennaciismon en Sovet-Unio, profite al la ŝovinista naciisma faŝismo eksterlanda, estus malspritaĵo. Natura amo al la patrolando, kia estas en Sovetio, ne signifas atakemon al alilandanoj k ne povas esti komparata kun la naciisma eduko en la faŝistaj nacioj, kie internaciismo (ĉiuj movadoj k organizoj tiucelaj aŭ kun tiu kvalito) estas persekutata k malpermesata. Patriotismo en Sovetio ne estas danĝera al alia popolo; ĝi estas memkompreneblaĵo en la nuna stato de la homaro k esence diferenca de la naciismo ŝovinista de la kapitalismaj faŝistaj ŝtatoj.

Malfortigi la nacian senton de la popolo, en la nomo de la bono de Socialismo (neante ties eblecon en nur unu sola lando, kiu cetere estas ĉirkaŭata de la malamikoj) estus neniel utila al la intereso de la laborista klaso

tutmonda, eĉ se oni rifuzas la valoron de la soveta eksperimento, kies gvidantoj profitis je la natura amsento al la patrolando, por starigi fortan defendocelan armeon.

Alia peko de la Soveta reĝimo, laŭ k-do Lanti, estas, ke Sovetio subskribis kontraktojn kun aliaj ŝtatoj, aliancigis kun Francio k aliĝis al la Ligo de la Nacioj. Tiu klara konsekvenco de la situacio ĝenerala, montras "perfidon al certaj marksismaj principoj, forlason de la interesoj de la proletaro", ktp. Sed agi male, t.e. praktiki sinmortigan politikon de izoliĝo, ĉu ne estus stulte ?

Sennaciismo diferencas de iu snoba "kosmopolitismo" en tio, ke ĝi unue postulas la ekziston de laboristara klasregado tutmonda. Sen tiu premiso, akcepti mondunuiĝon kiel rezulton el perfortaj konkeroj de avida sukcesanta naciismo, same ol kiel sekvon de libervola decido de sendependaj popoloj, tion mi serioze ne povas nomi "sennaciismo" sed absurda samnaciismo.

Mi supozas ne senbaze, ke abundas la sennaciistoj, kiuj ne povas esti partianoj de tiu identigo de nia doktrino kun imperialismo.

"Vera revoluciulo" - mi legis en la Manifesto - "devas esti kapabla IDEE anticipi". Mi konsentas. Sed ne estas "vera revoluciulo", laŭ mia honesta vidmaniero, tiu, kiu nur ŝvebas en filozofiaj nebulaĵoj k ne praktike laboradas en akordiĝo kun la cirkonstancoj.

Disvastigi plej bonan, neaplikeblan teorion, en kontraŭstaro al alia pli modesta, eĉ malperfekta sed farebla, estas malhelpi la progreson, almenaŭ tion mi pensas. Tiu starpunkto estas fakte reakcia !

Vilh. BOSK (19.317)

P.S. - Skribinte la supran artikolon mi, kiel sennaciisto, statas en embaraso pri tio, kia estu mia sinteno antaŭ la atako de la Mondfaŝismo al Hispanio. Ĉu mi helpu, aŭ ne kontraŭstaru al "sennaciigo" aŭ "samnaciigo", de mia naskiĝlando ? Ĉu mi konsideru la invadon de la intervenistoj kiel krimon aŭ kiel benon ? (ĉar okaze de la aneksio° de Abisenio fare de Italio, la plej

° = aneksado (Kompil. noto)

elstara sennaciisto opiniis, ke tio favoras la planojn por Socialismo en Tutmondo). Mi hazarde estas hispano, tial mi timas ne objektive alrigardi la aferon. Ja estas terure... Se mi povus provizore loĝi en glacia zono... Sed ĉi tie estas treege varme. V.B.

......

Noto de la kompilinto :

Pro la "personeca karaktero de tiu polemiko k pro la specialeco de la temo" la tiama Plenum-Komitato de SAT juĝis "ne oportuna ĝian publikigon en S-ulo" kaj transsendis ĝin al la Sennaciista Frakcio. E. Lanti respondis jene en la Sennaciista bulteno nº 2 de novembro 1937:

## ĈIA DILETANTISMO ESTU FOR!

Publika respondo al Kdo Vilh. BOSK.

Jamaŝiro-maĉi, aŭgusto 1937.

Estimata Kamarado,

Kun miksa intereso mi legis vian "publika letero pri sennaciismo". Iarilate ĝi tamen estas tre instrua, kvankam ne laŭ la senco, kiun eble vi opinias. Unue mi rimarku, ke viadire la Manifeston vi legis en 1934. Tri jaroj do forpasis. Nu, mi forte emas pensi, ke via memorkapablo ne estas tute senmanka. Aliel mi absolute ne povas kompreni, kial la leginto el 1934 k la aprobanto el 1937 estas la sama persono, kiu verkis la leteron al kiu mi nun respondas. Por konvinkiĝi pri tio, sufiĉas legi aŭ relegi la tekston de nia tezo pri sennaciismo por trovi plenan refuton al viaj asertoj. Ĵus farinte tiun eksperimenton mi povas nur rekomendi la saman al la legantoj. Ili ja povos konvinkiĝi, ke mia aserto ĝustas. En la Manifesto oni povas konstati, ke la gvidistoj de la labor-organizoj, kiuj ignoras esperanton, estis en 1931 (dato de la eldono) same vipataj kiel pli poste en

HEREZULO; ke la internaciistoj estis montrataj kiel senkonsciaj reakciuloj (pĝ. 26, ekz-e); ke pri Sovetio jam montriĝis forta dubo, rilate al ĝia socialismeco. Unuvorte, Kdo, vi povus trovi en la Manifesto la samajn motivojn por kritiki k riproĉi, kiel tiujn, kiujn vi trovis pli poste en HEREZULO. Kaj tio ne estas miriga, ĉar la tuto fontas el la sama inko, fluis el la sama plumo. Sufiĉe !... La legantoj mem faru la eksperimenton.

El la ĉi-supre dirita mi konkludos jene : Tial ke ni "kondamnas neniun sincerulon" (°) ni povus konsenti nur al jena via deklaro : "Depost mia aliĝo al la S.F. okazis grandaj ŝanĝoj en la internacia politiko; mia lando estis invadata de araboj, italoj k germanoj k tial mi ekkonsciis pri mia hispaneco k ne povas toleri tian invadon nek la perfidon de generalo Franko k.a. malbonaj hispanoj. Pro tio mi nun komprenas, ke la sennaciismo estas nur revo de utopiuloj, kiuj ne vidas la mondon tia, kia ĝi estas. Necesas ja batali por defendi la sendependecon de sia lando k sekve mi malkonfesas sennaciismon k refariĝas internaciisto".

Se tiele vi parolus, Kdo BOSK, via sinteno estus konsekvenca k neniel "kondamninda". Sed aprobi la enhavon de la Manifesto k skribi vian publikan leteron, tio estas rilati al la sennaciismo vere tro diletante. Ĉu prave aŭ malprave - pri tio nun ne eblas diskuti - la sennaciisma tezo celas montri, ke la internaciismo estas esence konservativa, eĉ reakcia (oni pensu pri la movadoj por la sendependeco de provincoj, kiuj jam delonge enkadriĝis en nacio); ke la homoj, kiuj volas pacigi la mondon, konservante la naciojn, iel similas al tiuj,kiuj volus elsekigi lagon per kribriloj. Kaj la samon oni povas diri pri la naivuloj, kiuj provas konstrui socialismon en iu anguleto de l'mondo k eĉ sur ĝia sesono.

-------

(°) kio tute ne signifas, ke ni ne kontraŭbatalas sincerajn opiniojn, se ni opinias ilin eraraj k danĝeraj; ŝajne Kdo BOSK ne tute komprenas la sencon de l'vorto "kondamni".

En via letero troviĝas parto, kiu ne rilatas rekte al la sennaciismo k ĝi sekve ne trovas anticipan respondon en la Manifesto. Temas pri mia sinteno al Sovetio. Dankon pro tio, ke vi donas al mi la okazon por eldiri denove mian opinion pri ĉiu demando. Mi jam publikigis broŝuron, kies konkludo estas, ke en Sovetio ne konstruiĝas socialismo, sed ke tie regas ruĝa faŝismo. Forpasis de tiam du jaroj k neniu refuto al mia tezo venis. Male, gravaj okazintaĵoj ĝin konfirmis. Lastatempe en laboristaj ĵurnaloj k revuoj ankaŭ aperis la kvalifiko : ruĝa faŝismo. Kaj mi eĉ havis la amaran plezuron ricevi leterojn de ge-kdoj, kiuj konfesis : "rilate Sovetion, vi ja estis tute prava; nun ni pensas kiel vi post la lastaj okazintaĵoj, sed antaŭe ni opiniis, ke vi pasie troigis...". Bedaŭrinde tiel ne estis; eĉ ne sufiĉe mi akcentis pri la terura danĝero, kiun konsistigas por la homaro la jezuiteca bolŝevismo, la senetikeca perĉiarimedeco Lenina, tiom draste aplikata de Stalin. Mi jam diris k ripetas, ke en neniu alia lando la laboristoj k kamparanoj estas tiom servutigitaj kiom estas tiuj el Sovetio, fare de la kreiĝanta nova klaso, fare de la oligarkoj el la Kremlo, fare de la sangosoifanta diktatoro Stalin. En neniu lando krom en Sovetio ekzistas la interna pasporto. Japana laboristo ne bezonas tian legitimilon por iri el Tokio al Osaka, sed Sovetiano sen ĝi ne povas iri el Moskvo al Leningrado !... Kaj nur en Sovetio la familio estas respondeca pro la "krimoj" de unu el siaj anoj kontraŭ la Ŝtato.

Okaze de la procesoj, kiuj sendis al morto malnovajn bolŝevistojn, la tuta mondo estis tre mirigita pro tio, ke la akuzitoj konfesis mem siajn "krimojn". Por kompreni tion, necesas scii, ke per tiu konfeso la akuzitoj celis eviti al siaj parencoj, al siaj gefiloj persekutojn k turmentojn ĉiaspecajn... - Turmentojn ? Jes ! Kaj laŭ aserto de Eŭgeno Lyons en "The American Mercury", eĉ infanoj estis torturataj antaŭ la okuloj de akuzitoj, por devigi ilin konfesi siajn "krimojn" kontraŭ la Ŝtato. Musolini k Hitler ne ankoraŭ atingis tian gradon da kruelo en sia diktatoreco... La krimoj de l'ruĝa faŝismo estas nenombreblaj k apenaŭ priskribeblaj. Se vi fermas la okulojn por ne vidi la realon k ŝtopas al vi la orelojn, por ne aŭdi la kriojn de l'viktimoj de Stalin, tio

estas afero de via konscienco; sed tiom facilan mi ne havas k sekve konsideras kiel devon konigi la rezultojn de mia longa observado k diversmaniera enketado super Sovetiaj aferoj.

Sed mi ne forsilentu ion ajn el mia penso k mi demandu : "Ĉu hazarde vi mem estas ankaŭ ia ruĝa faŝisto ? Ĉu vi aprobas la farojn de tiuj, kiuj buĉis 12 anojn de la Liberecana Junularo el Barcelono ? kiuj murdis la K-dojn Berneri, Barbieri, Nin k multajn aliajn ?" Jam longa estas la listo de l'viktimoj de la ruĝa faŝismo hispana, kiu estas importita el Moskvo.

Oni raportis al mi, ke dum la lasta SAT-Kongreso, Kdo HERNANDEZ via kunulo k eble amiko, eldiris, ke "ne necesas esti prava, sed forta", kio vekis indignon ĉe multaj kongresantoj (o). En tiu cinika eldiro ni trovas la ĝermojn de l'faŝismo. Tia senetikeco karakterizas la "moralon" de l'ĝangalo, la "moralon" de l'bolŝevistoj k de l' jezuitoj. Kiam via samlandano Ignaco de Lojola eldiris, ke "la celo pravigas la rimedojn", li ja estis la instruonto de Lenin, kiu rekomendis uzadon de ĉiaj rimedoj kontraŭ la "malamikon". Kiam Lenin faris sian jezuitecan rekomendon, tiam la "malamiko" konsistis el burĝoj, socialdemokratoj k anarkistoj; poste el la maristoj el Kronŝtad, kiujn mortpafigis Trocki; poste ĝi estis Trocki mem, kiun Zinovjev k Kamenev volis ke oni kondamnu je morto; poste, estis Zinovjev k Kamenev, kiujn Stalin mortpafigis; poste... La Tarpeusa Roko estas proksima de l'Kapitolo...

Estimata Kdo BOSK ! Mi ne forgesis kiom afable k helpeme vi rilatis al mi, okaze de mia restado unusemajna en Valencio. Malfacile mi povas kredi, ke vi aprobas la krimojn de l'ruĝaj faŝistoj en Katalunio k alie. Via jesa aŭ nea respondo estos al mi tre valora. Tamen mi demandas : Ĉu vi aprobas aŭ ne ? Mi havis la okazon observi k noti, kiom malbonfara estas la bolŝevisma senetikeco sur honestajn k bonfaremajn personojn iom simplanimaj. Al bona manĝaĵo ili aldonus venenon, se iu aŭtoritata persono klarigus, ke tio estas necesa por la sano de gasto. La perĉiarimedeco Lenina laŭ kiu bolŝevistoj devas menso-

-------

(o)Vidu pĝ.75 de la "protokolaro" (N°457 de S-ULO)

gi, kalumnii, ruzaĉi, murdi ktp... por venki la kontraŭulojn, sukcesis atingi similan rezulton ĉe kredemaj admirantoj. Mi ne pensas, ke vi apartenas al tia kategorio da homoj. Necesas do serĉi alian klarigon pri via sinteno. Ĉu do vi opinius, ke por praktikemulo, kiu volas ludi en la socio elstarantan rolon, necesas ke li apartenu ĉu al la ruĝa aŭ alikolora faŝismo, ĉar ŝajne la homaro devas trapasi tian regsistemon ? Kvankam mi ne konas vin intime, tamen mi malemas pensi ke tia hipotezo estas ĝusta koncerne vin. Sed se mi estus konvinkita ke tia estas via kazo, tuj mi formetus la skribilon, dirante : "Je tia vidpunkto vi pravas k la elmontro de simpatio por la sennaciismo povas nur malutili al via kariero".

La sennaciismo ne bezonas diletantojn, sed pionirojn, kiuj klare konscias, ke ilia agado k laboro ne donos al ili gloron, famon iaspecajn. Se en 1934 vi estus tre atente k komprenema leginta la <u>Manifeston</u>, vi certe substrekus k ne forgesus jenan alineon: "La plej esence grava laboro estas tiu de l'pioniroj, kiuj inventas, anticipas, dishakas en la arbaro el antaŭjuĝoj k tradicioj, kiu forsekigas la marĉon el rutino k tiel preparas la vojon, kiun pli poste sekvos la amaso..."

Sed vi ne sufiĉe atente legis aŭ verŝajne vi forgesis; aliel ne estas klarigeble, ke en via letero vi diras aprobi la enhavon de l'<u>Manifesto</u> k samtempe vokas al sennaciismo PER internaciismo. Estas kontraŭdiro en la esprimo mem. La celo de l'verketo ĝuste estas montri la <u>esencan</u>, <u>fundamentan diferencon</u> inter la du ismoj. En via letero vi parolas pri diletantismo, sed, estimata Kdo, per tio vi nur povas pensigi seriozan homon pri la biblia rakonto pri pajlo k trabo.

Mi emus diri ankoraŭ multon pri la temo, sed necesas, ke mi bridu mian rezonemon. Cetere la legantoj de ĉi tiu letero povas trovi kvazaŭ aldonon en artikolo kun la titolo "Ĉiu plenumu sian devon", kiu verŝajne aperos en S-ULO°).Tamen mi ne volas fini, ne parolante pri via aludo al mia "morto". Estas tute vere, ke mi volis mortigi Lanti-n k refariĝi simple Adam, la nekonatulo. Mi deziris laŭpove helpi al la neŭtrala movado en Japanio, opiniante, ke "universala lingvo entenas econ revoluciigan"

°)Tiu artikolo estas ĉi-sekve represita (Kompil.noto)

(pĝ. 16 en "For la Neùtralismon!"). La japana Polico tion ne permesis. Tial ke mi malsukcesis en mia provo pri sinmortigo, tute nature mi do emas denove labori por la sennaciismo. Certe mi ne lasos sen respondo atakojn de internaciistoj; mi ne toleros konfuzon, misklarigojn k diletantismon en nia pionira laboro. Mi ne laciĝos ripeti, ke estas danĝera iluzio kredi, ke oni povas atingi daùran pacon, konservante la naciojn; mi eventuale montros ke la sovetia patriotismo estas same danĝera kiel la japana, la germana, la itala k ĉiu cetera; ke plie la sovetiaj servutuloj havas absolute nenian intereson defendi sian servuton. Ĝuste pro tio ke ili ne havas intereson, Stalin decidis fari grandskalan agitadon porpatrian. Se la kompatindaj servutuloj fakte havus intereson, tia agitado ne estus necesa. Kaj la plej lerta sofisto ne kapablus liveri ŝajnkontentigan klarigon pri tiu ĉi historia fakto : kiam Sovetio estis reale minacata de kapitalistaj ŝtatoj; kiam ĝi ne aliĝis al la Ligo de Nacioj k ne alianciĝis kun la kapitalistaj Francio k Ĉekoslovakio, tiam la patriotismo ne estis agitobjekto de Komintern. Se plaĉas al vi fermi la okulojn, nu faru, sed ne postulu, ke ĉiu ankaù blindiĝu...

Mi plie aldiru, ke ankaù la ĉinaj kulioj k kamparanoj neniel pliboniĝos sian sorton, defendante la regadon de Ĉang-kaj-Ŝek kontraù la japana invado. Unuvorte k konklude : saĝa homo ne elektas inter pesto k ĥolero, sed provas ŝirmi sin kontraù ĉia malsano. Kaj se sennaciisto falas viktime dum milito, li almenaù povas ĝui la internan kontenton, ke la militistoj sklavigis nur lian korpon, ne lian spiriton, lian animon. Nenio ŝajnas al mi pli malsaĝa ol homoj, kiuj akceptas enkateniĝon, kredante, ke ili per tio liberiĝos. Se la milionoj da francoj, britoj kc., kiuj entuziasme batalis k mortis dum la milito por venki la "germanan imperialismon", por ke estu "la lasta milito", povus ekvidi la nunan staton de l'mondo, ili certe komprenus, kiagrade ili estis trompataj, kiagrade ili estis naivaj...

Nuntempe sennaciisto povas havi nur la senton, ke li troviĝas k devas vivi en granda frenezulejo. Ĉu pro tio li agu kiel la frenezuloj, kiuj ĉirkaùas lin? Se mi juĝas laù la sencenhavo de via letero, Kdo BOSK, la nura logika

respondo al tia demando devas esti jesa; permesu, ke la mia estu nea...

Kun estimo k bonmemoro : E. LANTI

# Ĉiu plenumu sian devon...

(Tiu ĉi artikolo, kiun E. Lanti subskribis per "E.L. ITANŜA", aperis en "Sennaciulo" de 25.Nov. 1937)

Nenio ŝajnas al mi pli ridinda ol pacistoj, kiuj sin ĝeme turnas al la tuta mondo, dirante : "Ne batalu !... Ne mortigu !... Vivu pace !... Estu fratoj !..." Tiuj pacistoj unue ne havas sufiĉe fortan voĉon por aŭdigi ĝin trans la landlimojn; sed eĉ se ili havus, tio neniel signifus, ke la mondo aŭskultas, atentas, komprenas...

La bombastaj porpacaj alvokoj ja estas ne nur ridindaj k senefikaj, sed eĉ maltrafaj. Kial paroli pri frateco al homoj, kiuj fakte ne estas, nek povas esti fratoj? "Esti fratoj", tio signifas aparteni al la sama familio, havi saman patron - almenaŭ spiritan - saman moron, saman lingvon.

Ĉu tiel estas inter la homoj de malsamaj nacioj ? Certe ne ! Ne nur la nacianoj diversspecaj havas malsamajn morojn k kutimojn, sed ankaŭ malsamajn lingvojn; ili do tute ne povas interkompreniĝi k sekve estas tre ridinde konsideri tiajn homojn kiel fratojn el sama familio.

Tian bedaŭrindan staton ni nun ne povas aliigi. Malgraŭ tio, ke esperanto ekzistas jam de 50 jaroj, tamen estas plorinda fakto, ke la esperantistoj - mi ne diras la esperantanoj - estas ankoraŭ tre malmultenombraj. Kaj kiom da ili komprenas la profundan signifon de l'samlingveco, de tiu fakto, ke per uzado, aplikado de esperanto

kun homoj el ĉiuj mondpartoj estas eble akiri menson de mondcivitano ? Kiom da ili penadis senigi sin je ĉia naciemo k tiel fariĝi taŭgaj por interfratiĝo malgraŭ ĉiuj landlimoj ? Jes ja, nur samlingvanoj povas eksenti k fine kompreni, konscii, ke ili konsistigas la embrion de la "granda rondo familia", pri kiu parolis Zamenhof.

Inter esperantistoj estas logike paroli pri tutmonda interfratiĝo, pri paco k amo. Sed maltrafe, ridindege estas prediki fratecon al homoj, kiuj efektive ne povas esti fratoj, ĉar ili devas stari mutaj unuj apud la aliaj, pro neeblo interkompreniĝi.

Konsekvence, al la nacianoj, kiuj povas esti fratoj nur inter difinitaj limoj, pli malpli longaj; al la homoj, kiuj volas konservi, defendi la naciecojn, ni ne rekomendu interfratiĝon, sed simple diru : "Vi plenumu vian devon. La sendependeco de via lando estas minaqata k vi deziras, ke ĝi restu plene suverena; nu, bone, vi devas ja esti preta por oferi vian vivon tiucele. Vi devas akcepti loĝi en kazerno, vivaĉi en tranĉeoj, obeadi blinde al iaj ajn ordonoj diktatorecaj de l'milita stabo; vi devas unuvorte rezigni vian homecon por teni k konservi vian naciecon..."

Verdire, kiam naciistoj diversspecaj, diversnuancaj k diverslandaj buĉas unuj la aliajn por la gloro de sia respektiva patrio, tiam nia koro bedaŭras k kompatas, sed nia cerbo ne povas ne kompreni, ke tia buĉado estas tute normala... Mi eĉ konfesas, ke iafoje venis al mi la amara penso ke ju pli multe da patriotoj estas elmondigitaj per sia reciproka malsaĝo, des pli bone ! Ili plenumis sian devon. Kaj estas konstatebla fakto, ke naciistojn oni ne povas konvinki per raciaj argumentoj. Sekve...

Kio estas vere terura k priplorinda, tio estas, ke homoj, kiuj ellernis k praktikadis esperanton, kiuj penadis senigi sin je ĉia naciemo, t.e. la sennaciistoj, tiuj riskas esti perforte eldevigataj partopreni patriotan buĉadon. Racipensante, oni nepre alvenas al la konkludo, ke nur tiaj homoj estas kompatindaj, tial ke dum milito ili ne plenumas sian devon, sed male agas kontraŭvole, k eĉ riproĉate de sia konscienco. La devo de

sennaciisto estas tute mala je tiu de patrioto, de internaciisto, de ĉiu ajn, kiu predikas, ke la nacioj gardu sian sendependecon. Internaciisto devas buĉi aŭ esti buĉata; sed sennaciisto devas nepre per ĉiuj fortoj penadi por eviti partoprenon en bataloj, kiuj por li estas tute sensencaj.

Kiam la Lenina k Uilsona (Wilson, prezidinto de Usono) principo pri sendependeco de l'nacioj estas ie ajn minacata, tiam ĉiu internaciisto devas volontuliĝi por defendi k savi la sanktan principon. Kaj male estas la devo de ĉiu homo, kiu akiris la firman konvinkon, ke tia principo estas esence reakcia, resti nepre ekster la internaciaj bataloj. Nur la klasbatalon partoprenu sennaciisto; nur por defendi sian homecon li konsentu morti aŭ mortigi... Kaj tiurilate tre menciinda estas la fakto, ke homoj devis dum jarcentoj elbataladi la rajton ne aparteni al iu ajn eklezio. Similan batalon devos fari la sennaciistoj por akiri la rajton ne esti naciano. Ili devas organiziĝi tiucele k nenial imiti la internaciistojn, kies bonintenca agado estas tamen niaopinie esence reakcia...

Ĉiu ja plenumu sian devon k tion farante neniu rajtos riproĉi al la alia. Kiu kuraĝe agas laŭ sia konvinko k konscienco, tiu indas estimon.

Kaj aliparte SAT havas ankaŭ sian specialan devon : esti same akceptema al la tezo de l'sennaciistoj, kiel al tiu de la internaciistoj. Nia organizo estas laŭstatute ekstertendenca k sekve ne havas, nek povas racie havi partiecan programon. Ni ĉiuj plenumu nian devon...

E. L. ITANŜA.

## Verkoj de E. Lanti

❀ **For la Neŭtralismon !**

Broŝuro, kiu agitas por disigo de la laborista esperantistaro de la "neŭtrala" movado kaj motivigas ĝian neceson. ... 1 FF
Havebla ĉe SAT, 67 av.Gambetta, 75020 Paris

❀ **La Laborista Esperantismo**

Nepre necesa teksto por ĉiu laborista esperantisto, kiu deziras konatiĝi kun taskoj, celoj kaj organizmaniero de la laborista esp. movado.
Havebla ĉe LJP-broŝurservo ... 1 FF

❀ **Naciismo**

Studo kaj deveno, evoluado kaj sekvoj (elĉ.)

❀ **Vortoj de K-do E. Lanti**

Kolekto el artikoloj kaj verketoj pri organizado, principoj, ideoj de SAT, edukaj kaj filozofiaj problemoj. Tiu libro estas elĉerpita, sed la plej interesaj, ĉiam aktualaj partoj estas reeldonitaj en du broŝuroj :

- Lanti pri Sennaciismo (SAT, Parizo)..1,30 FF
- Lanti pri Edukado (LJP) ...1,50 FF

❀ **Leteroj de E. Lanti** (elĉerpita)

La plej interesaj partoj estas reeldonitaj en la broŝuro :
. El leteroj de E. Lanti (LJP) ...1,25 FF

❀ **Absolutismo**

Parolado en Antverpeno, 1934.
Havebla ĉe LJP-broŝurservo ... 1 FF

❀ **Herezulo - Herezaĵo**

La gvidprincipoj de "Herezulo", la respondo al la malkontentaj legintoj de "Absolutismo", la respondo al la publika letero pri sennaciismo (de V.Bosk) LJP-broŝuro ...1,50 FF

---

Gérant & imprimeur : Baudé, 47340 Laroque

Broŝura serio de L.J.P.
adreso: La Juna Penso, F 47340 Laroque Timbaut (Francio)
poŝtkonto: La Juna Penso, 3 374 04 M, Bordeaux

Mendoj: Ĉiu ajn povas mendi laŭ la ĉi-suba listo. Sur la ĝirkupono oni povas uzi la titolmallongigojn. La prezoj inkludas la afrankon.
Abonoj: Por ricevi ĉiujn noveldonaĵojn el la broŝura serio, ĝiri minimume 10 FF. Tiel oni ricevas la novajn kajerojn ĝis elĉerpiĝo de la monprovizo.

## Disponeblaj broŝuroj

| | | FF |
|---|---|---|
| AK. | Alveno de abundo kaj konsumsocio (P.V.Berthier) | 0,75 |
| NR. | Ĉu neperforta revolucio aŭ liberiga milito (Ebert) | 1. |
| VK. | Vivi en komunumo (M. Schneller) | 0,75 |
| NH. | Manlibro de nova homo (Rufegon) | 1. |
| GL. | Granda liberiĝo de l'homoj per scienco (J.Duboin) | 1. |
| IE. | Initiation à l'espéranto (An Kaŭ) por francoj | 1,25 |
| EF. | Espéranto en 24 pages (por franclingvanoj) | 0,75 |
| EH. | Espéranto en 24 páginas (por hispanlingvanoj) | 0,75 |
| PE. | Pri edukado (el "Vortoj" de E. Lanti) | 1,50 |
| EV. | Eduko kaj vivsignifo (Jiddu Krishnamurti) | 1,50 |
| MS. | Memvola servuto (La Boesi) | 1,25 |
| RR. | Du rêve à la réalité : l'espéranto (H. Masson) | 1,50 |
| EL. | El leteroj de E. Lanti | 1,25 |
| PP. | Por la paco, kontraŭ la milito (citaĵoj) | 1,25 |
| NP. | Nekombitaj pensoj (S.J.Lec) | 1,25 |
| RS. | Rido sanigas! (satira poemaro de Josef Burger) | 1,50 |
| LP. | La liberecana penso (citaĵoj) | 1,25 |
| AO. | Anarkio kaj organizo (E.Malatesta) | 1,25 |
| AB. | Absolutismo (prelego de E. Lanti) | 1. |
| NM. | Ne mortigu! (Leo Tolstoj) | 0,50 |
| PI. | La rajto de pigro (Paŭlo Lafargue) | 1,50 |
| HP. | La Humanitaristaj Principoj (Eŭgeno Relgis) | 1,25 |
| PC. | La Parabolo pri la cisterno (E. Bellamy) | 0,75 |
| DU. | Durruti, simbolo de la hispana revolucio (Pario) | 1,25 |
| PT. | La Piramido de l'Tiranismo (F.Domela Nieuwenhuis) | 1,25 |
| PO. | Paco en Proksima Oriento (Aharon Cohen) | 1,25 |
| CM. | Civila Malobeemo (H.D. Thoreau) | 1,25 |
| AC. | Atomcentraloj (debato enkondukita de R. Levreaud) | 1. |
| TM. | Tra la mondo per biciklo kaj esperanto (Alfa-Beta) | 1,50 |
| HM. | Historia Materiismo - Ĝeneralaj konsideroj pri la problemo de organizado (Anton Pannekoek) | 1,25 |
| KE. | La Kvina Evangelio (Han Riner) | 6. |

CPPAP .Gérant & imprimeur: Baudé, 47340 Laroque